Or il n'y a, en règle générale, aucun inconvénient à traduire dans les deux phrases, le mot caricature par *karikaturo* ; le contexte empêchera qu'on puisse douter de l'exacte signification du mot.

Mais si l'on veut faire la différence de sens, rien de plus simple ; on réservera le dérivé immédiat, c'est-à-dire, ici, *karikaturo*, à l'action de caricaturer. (1^{re} phrase).

Et pour le résultat de cette action on prendra un dérivé médiat, c'est-à-dire formé par un affixe ; dans notre exemple on dira, par exemple, *karikaturo*. (2^{me} phrase).

**

On pourra aussi examiner s'il n'y a pas avantage à adopter un affixe spécial indiquant l'objet concret résultat de l'action.

Or nos langues emploient couramment un tel affixe, l'affixe *ur* que l'on trouve dans le latin *flexura*, *figura*, *mensura*, *pictura* ; dans le français *rupture*, *fêlure*, *brisure*, *rupture*, *peinture*, *écriture*, *ouverture*, *fissure*, *couture*, *suture*, *confiture*, etc. ; dans l'anglais *figure*, *aperture*, *abbreviature*, *acupuncture*, *mixture*, *caricature*, *closure*, etc.

Si on accepte les 2 règles suivantes :

Germanlando, li starigis la diversajn kategoriojn da rilatoj ekzistantaj inter infinitivoj kaj substantivoj senpere devenantaj unu el alia, kaj alia el unu. Kaj li konstatis ke, inter tiuj diversaj kategorioj, du el ili superregas absolute ; estas la kategorioj en kiuj la substantivo senpere elvenanta el verbo montras la *agon* aŭ la *staton* esprimantan de tiu verbo.

Ekzemploj:

parolo	estas la ago rilatanta al	paroli
lego	estas la ago rilatanta al	legi
fondo	estas la ago rilatanta al	fondi
enuo	estas la stato rilatanta al	enui
amo	estas la stato rilatanta al	ami
espero	estas la ago aŭ la stato rilatanta al	esperi
trompo	estas la ago rilatanta al	trompi
mensogo	estas la ago rilatanta al	mensogi
paco	estas la stato rilatanta al	paci
k. c., k. c.		

Plie, oni ofte konstatis ke estas senutila, aŭ nebla, apartigi la proprediratan agon de la rezultato esenca aŭ senpera de la ago.

Ekzemple, « *parolo* » povas signifi ĉu agon rilatantan al *paroli*, ĉu unu parolon mem (tion, kion oni parolas).

« *Diro* » povas signifi ĉu agon rilatantan al diri, ĉu diron mem (tion, kion oni diras).

« *Karikaturo* » povas signifi tiel taŭge agon rilatantan al *karikaturo*, kiel *karikaturo* mem (la rezultaton, la desegnon).

Ekzemploj : *La karikaturo* estas arto en kiu famigis homoj kiel Daumier kaj Gavarni.

Karikaturo akceptinda, postulas montron de la realaj trajtoj de la modelo, malbonformigitaj kaj akcentigitaj laŭ direkto de ridindeco, sed facilaj por rekoni.

En la unua frazo la vorto « *karikaturo* » signifas « generalan agon rilatantan al *karikaturo* » ; en la dua frazo, la sama vorto signifas « apartan rezultaton de tiu ago ».

Nu, ĝenerale kaj regule, nenia malfacilaĵo okazas, kiam oni tradukas, en ambaŭ frazoj, la francan vorton « caricature » per « *karikaturo* » ; la kunteksto malebligas dubon pri la preciza signifo de l'vorto.

Sed, se oni intencas montri la malsamecon pri senco, tio estas tre simpla ; oni aljuĝos la senperan devenaĵon, estas diri « *karikaturo* » por la ago mem. (1^a frazo).

Kaj por la rezultato de la ago, oni elektos peran devenaĵon, estas diri devenaĵo per afikso ; en nia ekzemplo oni diros, ekzemple, « *karikaturo* ». (2^a frazo).

**

Oni povos ankaŭ ekzameni ĉu ne estos pli utila akcepti specialan afikson montrantan la konkretan objekton, rezultaton de la ago.

Nu ! niaj lingvoj uzas flue tian afikson, kiu estas la afikso *ur*, kiu oni trovas en latina lingvo : *flexura*, *figura*, *mensura*, *pictura* ; en la franca lingvo : *rupture*, *fêlure*, *brisure*, *rupture*, *peinture*, *écriture*, *ouverture*, *fissure*, *couture*, *suture*, *confiture*, k. c. ; en la angla lingvo : *figure*, *aperture*, *abbreviature*, *acupuncture*, *mixture*, *caricature*, *closure*, k. c.

Se oni akceptus la du sekvantajn regulojn :

1^o) le substantif immédiatement dérivé d'un verbe signifie l'action ou l'état exprimé par ce verbe;
 2^o) l'affixe *ur* joint à un radical verbal sert à former un substantif qui indique l'objet concret résultant de l'action exprimée par le verbe ;
 on formera des séries de dérivés tels que :

- skribi: écrire,
- skribo: l'action d'écrire,
- skriburo: l'écriture ;
- fendi: fendre,
- fendo: l'action de fendre,
- fenduro: la fente (résultat de l'action), la fêlure;
- rompi: rompre,
- rompo: l'action de rompre,
- rompuro: la cassure.

* * *

On avait d'abord cru que le suffixe — aj pourrait remplir le rôle que nous venons de faire jouer au suffixe — ur. Mais un tel emploi aurait parfois prêté à l'équivoque.

Ainsi considérons le mot *kopii* = copier ; l'action de copier se dira *kopio* ; le résultat de cette action se dira *kopiuro* (la copie faite) ; et on aura à former le mot qui désignera « l'objet copié, le modèle reproduit », c'est-à-dire l'objet passif de l'action, ou encore « la chose copiée ».

C'est à former ce dernier terme que nous réserverons le suffixe — aj.

Nous dirons donc *kopiajo* = la chose copiée.

- De même
- skribi = écrire
 - skribo = l'action d'écrire (l'écriture)
 - skriburo = le résultat de cette action
 - skribaĵo = la chose écrite, l'écrit ;

- imiti = imiter
- imito = l'action d'imiter
- imituro = le résultat de l'imitation (le fac-similé)
- imitaĵo = la chose imitée (le modèle).

La phrase suivante montrera la nécessité qu'il y a de pouvoir faire ces diverses distinctions :

L'écriture était connue des Chaldéens ; leur écriture a reçu le nom de cunéiforme ; leurs écrits nous sont demeurés en partie.

La skribo (l'action d'écrire) estis konata de l' Kaldeoj ; ilian skriburon (leur écriture, leur genre d'écrire avec ses caractères spéciaux) oni nomis « kuneiforma » (kojnoforma) ; iliajn skribaĵojn ni posedas parte.

* * *

Il est important de bien noter que, règle générale, on emploiera le substantif *immédiatement dérivé* d'un radical verbal, indifféremment avec le sens d'action ou de résultat, à condition qu'aucun doute ne soit possible sur la vraie signification du mot.

On emploiera le suffixe *ur* s'il est nécessaire d'empêcher la confusion.

(A suivre).

B. S.

1^e la substantivo senpere devenanta de verbo, signifas agon aŭ staton esprimitan per la verbo ;
 2^e la afikso *ur*, kunigita al verba radiko, utilas por formi la substantivon, kiu montras la konkretan objekton, rezultaton de la ago esprimita per la verbo, oni formos seriojn da devenaĵoj, tiaj ke :

- skribi,
- skribo: la ago mem,
- skriburo: la rezultato ricevita sur papero ;
- fendi,
- fendo: la ago mem,
- fenduro: la rezultato ricevita sur objekto ;
- rompi,
- rompo: la ago mem,
- rompuro: la rezultato ricevita sur sia objekto.

* * *

Oni opiniis, unue, ke la sufikso *aj* estus ebla plenumi la rolon, kiun ni ĵus aljuĝis al la sufikso *ur*. Sed tiela uzo iafaje enkondukus dusencan.

Ekzemple ni konsideru la vorton « *kopii* » ; la ago de iu kiu kopias, estos « *kopio* » ; la rezultato de tiu ago estos « *kopiuro* » (la ricevita provo) ; kaj oni devas ankoraŭ formi vorton, kiu signifos « la objekton, kiun oni kopiis, la modelon reproduktitan » estas diri la pasivan objekton de la ago, aŭ ankoraŭ « la objekton kopiitan ».

Por formigi tiun vorton, ni elektos la sufikson *aj*.

Ni do diros: *kopiajo* = la objekto kopiita aŭ kopiata.

- Same:
- skribi
 - skribo = la ago, farata per skribanto,
 - skriburo = la rezultato de tiu ago,
 - skribaĵo = la teksto reproduktita ; tio kion oni skribis.

- imiti
- imito = la ago, de tiu kiu imitas,
- imituro = la rezultato, la nova objekto (*fac simile*)
- imitaĵo = la unua objekto, la modelo.

La sekvanta frazo montros la necesecon povi diferenci klare tiujn diversajn nuancojn.

* * *

Estas nepre necesa bone noti ke, je ĝenerala regulo, oni uzos la substantivon *senpere devenantan* de verba radiko, indiferece kun la senco de ago aŭ de rezultato, kondiĉe ke nenia dubo estu ebla pri la vera signifo de la vorto.

Oni uzos la sufikson *ur* se estas necesa forigi ian malklarecon.

(Daŭrigota).

B. S.

TRA LA MONDO ESPERANTISTA

KELKLINIAJ NOVAĴOJ.

Baldaŭ aperos broŝuron (en franca lingvo) de la « Raporto pri la Internacia lingvo » prezentita de Em. Chapelier kaj G. Marin, ĉe la Internacia Libertaria Kongreso, kiu okazis en Amsterdam. La broŝuro enhavas ankaŭ la Esperantan Gramatikon kaj estos bona propagandilo. Ĝi estos aĉetebla po 15 centimoj ĉe kolonio « La Eksperimento », 57, rue Verte, Boitsfort (Belglando).

Ni plezure sciigas ke nova grupo fondiĝis en Mahon, insuloj Balears, de kiu la prezidanto estas S^{ro} Josefo M^a Doménech Puigjaner kaj la sekretario S^{ro} Bartolomeo Pons Aragonés. La adreso estas : Mahona grupo Esperantista. — Ateneo. — Mahon (Balears).

Jam oni citas nombron da servoj, kiujn faris uzo de Esperanto en la ĉiutaga batalo por vivo. Bulgara samideano, Stefano Minkov, post milita servo en sia patrolando, sukcesis trovi laboron en Boulogne s/mer, dank' al helpo de Esperanto kaj de ĝiaj adeptoj.

Pli kaj pli, la grupoj ricevas helpon de la diversaj oficialaj administracioj ; ni citu kelkajn el ili. La grupo de Charenton (apud Parizo) ricevis : de la ĝenerala Konsilantaro de la departemento 50 fr. ; de la urboj Charenton, 25 fr., Saint-Maurice 25 fr., Alfortville 50 fr.

En urbo Saint-Etienne, la urbeŝtaro liveras ĉambregon por la kunvenoj de l' grupo kaj decidis donaci jaran subvencian da 300 frankoj por la propagando.

La Konsilantaro de urbo Valencia (Hispanlando) donacis al la tiea grupo jaran monhelpon da 500 pesetoj.

La Dana ĵurnalo « Politiken » aranĝos Esperantistan vojaĝon por 50 el la lernantoj de l' kurso organizita en Kopenhago. La vojaĝantoj vizitos Hambourg, Köln kaj Paris, kie ili loĝos dum ĉirkaŭ unu semajno.

La nova ĵurnalo « L'Etoile Espérantiste » disdonis sian unuan numeron, tre interesan, precipe por la Francoj. Ni deziras bonvenon al nia nova kunfrato kiu estas redaktata de tre lertaj, bonekonataj samideanoj.

Oni ankoraŭ anoncas baldaŭan aperon de ĵurnalo en Magdeburg « Germana Esperanta-gazeto ».

Ni ricevis ankaŭ la duan enhavon de la dua numero de l' ĵurnalo « Laboro ». La enhavo de la antaŭa dua numero eble ne plaĉis al la « direktoroj de la movo ! » Tamen ĝia enhavo estas multe pli interesa ol la enhavo de la ĵus aperinta numero 2^a. Ni parolos pli malfrue pri tio.

Por havi en estonteco bonan kaj ĝustan adresaron de ĉiuj Esperantistoj, la samideanoj insiste estas petataj, sendi per poŝtkarto klare kaj legeble skribita sian adreson nunan kaj ĉiun ŝanĝon de l' adreso al:

Rudolf Rieal, Austrujo, Wien III, obere Viaduktgasse, 36.

Kaj ankaŭ al :
 Félicien de Ménil, librairie Hachette, 79, boulevard St. Germain, Paris.

MOZANO.

OPINIO DE LA ĴURNALOJ.

Pri la decidoj de la Delegacia Komitato.

La ĵurnalo « Esperanto » en longa artikolo (12^a de decembro), ekzamenas denove la situacion de la demando. Ni elĉerpas el ĝia artikolo « La nuna necesajo » la sekvantajn liniojn :

Kompreneble, inter tiuj reformoj kaj aldonoj, kelkaj estas enkondukeblaj sen danĝero kaj estas, se ne tuj akceptindaj, almenaŭ diskutindaj, sed antaŭ ĉio estas necesa unu kondiĉo, pri kiu oni nun tute silentas, nome : kiu en la Esperantistaro havas la rajton proponi (ne trudi) difinitajn plibonigojn kaj aldonojn en nian lingvon, aŭ per aliaj vortoj, kiu aŭtoritato reprezentas la tutan Esperantistaron kaj rajtas paroli en ĝia nomo ? Tiu ĉi demando havas apartan gravecon en la momento kiam la komitato de la Delegitaro prezentas al la Esperantistaro ion, kiun ni devas atente ekzameni kaj respondi. La diritan demandon kelkaj Esperantistoj sendube respondos per tio, ke D^o Zamenhof havas nepridisputeblan aŭtoritatecon super la tuta Esperantistaro ; sed, oni scias, ke de la komenco de nia afero, D^o Zamenhof fordonis ĉian rajton de aŭtoritato pri Esperanto, kiu jam fariĝis la posedaĵo de la tuta publiko esperantista.

Ni do estas en tiu bedaŭrinda situacio : la Esperantistoj ekzistas, sed ili havas absolute nenan rajtan aŭtoritaton kaj nenan laŭlegan interligilon. Por garantii nian unuecon en ĉiuj demandoj interesantaj nian aferon, ni havas nur moralan, pure idean ligilon, facile rompeblan. Ĝis nun, pro tio ke nia movado estis ankoraŭ malgranda, ni ne plene konstatis la malbonecon kaj danĝeron de tiu sistemo, sed ĵus venis la unua grava fakto, kiu montras, ke ni ne povas resti en tia situacio. Al la Delegitaro, kiu proponas ion difinitan al la Esperantistaro, povas plenrajte kaj oficiale respondi *neniu*, ĉar ekzistas nur disaj Esperantistoj kaj disaj esperantistaj organizaĵoj, sed nenia kompetenta reprezentanto de la esperantistaro.

Kelkaj personoj supozos, ke ni eble deziras restarigi la diversspecajn projektojn de Ligo, kiun la Bulonja kongreso ne volis. Tiu opinio estas tute ne ĝusta. La Esperantistoj tre certe ne deziras havi centran aŭtoritaton, kiu direktos la propagandon kaj sin okupos pri ĉiuj detaloj de nia movado ; ili tute ne deziras havi ian aŭtoritaton, kiu iel limigus nian liberecon kaj iniciativecon per enmeksiĝo en la vivo de niaj societoj, sed simple kompetentan reprezentantaron, kiu rajtos decidi pri la demandoj, kiuj interesas la tutan Esperantistaron kaj havas internacian karakteron. Tiu organizaĵo ankaŭ neniel celas forigi la nun ekzistantajn Centran Oficejon, Lingvan komitaton, k. t. p., sed ilin rajtigi kaj doni al ili en la nomo de la Esperantistaro difinitan mandaton, kiun ili ĝis nun ne havas.

La « Fundamento » de Esperanto povos ankaŭ akiri per tia maniero leĝan rajtigon, kiun ĝi ne ankoraŭ posedas, ĉar ĝi estis akceptita de la Bulonja kongreso, kiu ne povis leĝofari, sed nur rekomendi ; en tiu rilato, tiu « Fundamento » estus cetere tre facile atakebla

H. HODLER.

KRONIKO DE LA GRUPOJ.

Bruxelles. — Le commandant Lemaire a donné avec succès une conférence à la section « L'Emancipation » à la Maison du Peuple de Bruxelles. Quatre vingt personnes y assistaient et bon nombre d'entr'elles se sont fait inscrire pour le cours, que M. J. Coox a commencé le 17 décembre. La secrétaire de la section organisatrice est Mademoiselle Zeka.

Le cours organisé par l'Université populaire de Schaerbeek a commencé le 21 décembre et aura lieu tous les samedis dans le local de l'Université, 85, rue des Palais. Il sera donné par Mademoiselle C. Simon, professeur diplômé de la Ligue.

Le groupe « Pioniro » fêtera le nouvel an et son nouveau local par un souper, qui aura lieu le 8 janvier au siège du groupe même, Hôtel de Cologne, rue de la Fourche, 17, à Bruxelles. Nous invitons nos amis à soigneusement noter la nouvelle adresse du groupe.

Liège. — L'Assemblée générale du groupe Espérantiste liégeois a eu lieu le 18 novembre et on a décidé de lui donner une nouvelle impulsion et de parler Esperanto à toutes les réunions. Le cours du groupe continue avec succès et même une soirée musicale est en voie de préparation. Le groupe donc ne s'endort pas et bataille courageusement, comme les autres groupes, pour l'heureux avancement de notre cause. La propagande est un peu plus ingrate au pays des « têtes de houille » mais le résultat en est d'autant plus louable.

Antwerpen. — Onder handteekening der heeren Drs R. Brandligt, W. Broeckaert, I. Gunzburg, E. Leclercq, E. Moons, A. Mommaers en W. Van der Biest verscheen dezer dagen een warme oproep aan de heeren geneesheeren om onder het geneeskundig korps der stad eenen cursus van Esperanto in te richten. De heer Dr Leclercq, secretaris der A. G. E., heeft reeds vele bijtredingen ontvangen; de leergang zal eerlang geopend worden.

— Het pedagogisch tijdschrift « Ons Woord » bevat in zijn nummer van 1^o December een zeer lovend artikel over Esperanto. Er bestaat sedert eenigen tijd een zeer drukke briefwisseling tusschen de Antwerpsche onderwijzers en hunne Japaneesche collega's.

— Aan al de stedelijke gestichten van onderwijs is thans eene opgave tentoongesteld van al de scholen der verschillende graden en de leergangen door het Gemeentebestuur ingericht of ondersteund. Op deze lijst komen ook de cursussen van Esperanto voor, gesticht door de *Antwerpena Grupo Esperantista*.

Province de « Hainaut ». — La propagande devient maintenant intense dans cette province, et nous pouvons annoncer les diverses conférences que fera M. Cardinal, entr'autres à Jemappes le 5 janvier, à Mons, à l'Université populaire le 14 janvier et à La Louvière, à « l'Association des élèves diplômés de l'École industrielle, professionnelle et commerciale de La Louvière ». On annonce déjà la fondation de quelques nouveaux groupes, qui conserveront et feront fructifier la bonne semence.

Bruselo. — Komandanto Lemaire faris plensukcesan paroladon ĉe la sekcio « L'Emancipation » (Liberegeco) en la Domo de l'Popolo de Bruselo. Okdek personoj alestis kaj multaj el ili enskribiĝis por la kurso, kiun S^{ro} J. Coox komencis de la 17^a de Decembro. La sekretarino de la organizanta sekcio estas Fraŭlino Zeka.

La kurso organizita de la Popola Universitato de Schaerbeek komencis de la 21^a de Decembro kaj okazos ĉiusabate en loko de la Universitato, 85, rue des Palais. La profesoro estas Fraŭlino C. Simon, diplomitino de la Ligo.

La grupo « Pioniro » festos la novan jaron kaj ĝian novan sidejon per festeno, kiu okazos dum la 8^a de Januaro, en sidejo mem de la grupo, Hôtel de Cologne, rue de la Fourche n^o 17, Bruselo. Ni invitas niajn amikojn zorge noti tiun novan adreson de la grupo.

Liège. — La ĝenerala kunveno de la Liège grupo Esperantista okazis dum la 18^a de Novembro, kaj oni decidis novan agadon kaj uzon de Esperanto en ĉiuj kunvenoj. La kurso de la grupo daŭras sukcese kaj eĉ muzika vesperfestado estos baldaŭ organizita. La grupo do bone ne ekdormas kaj kuraĝe batalas, kiel la aliaj grupoj, por la feliĉa antaŭeniĝo de nia afero. La propagando estas iom pli malfacila en la lando de la « kapoj de terkarbo » sed la rezultato estas tiom pli laŭdinda.

Antwerpeno. — Dum la lastaj tagoj aperis, subskribita de S^{roj} Drs R. Brandligt, W. Broeckaert, I. Gunzburg, E. Leclercq, E. Moons, A. Mommaers kaj W. Van der Biest, varma alvoko al la S^{oj} kuracistoj por organizi inter la Antverpena kuracistaro kurson de Esperanto. S^{ro} Dr Leclercq, sekretario de la A. G. E. jam ricevis multajn aliĝojn; la kurso komenciĝos post ne longe.

— La pedagogia revuo « Ons Woord » enhavas en ĝia numero de la 1^a de Decembro tre laŭdan artikolon pri Esperanto. De kelka tempo ekzistas tre ofta interŝanĝo de korespondadoj inter la Antverpenaj instruistoj kaj iliaj Japanaj kolegoj.

— Al ĉiuj instruaj institutoj estas nun elmetita tabelo de la diversgradaj lernejoj kaj kursoj, organizitaj aŭ subtenitaj de la Urbeŝtaro. Sur tiu ĉi nomaro figuris ankaŭ la kursoj de Esperanto, starigitaj de la *Antwerpena Grupo Esperantista*.

Provinco « Hainaut ». — La propagando fariĝas nune intensa en tiu provinco, kaj ni povas anonci diversajn paroladojn, kiujn intencas fari S^{ro} Cardinal nome en Jemappes dum la 5^a de Januaro, en Mons, ĉe la Popola Universitato dum la 14^a de Januaro, kaj en La Louvière, ĉe la « Asocio de la lernantoj diplomitaj de la Industria, profesia kaj komerca Lernejo de La Louvière ». On anoncas jam de nun fondon de kelkaj novaj grupoj, kiuj konservos kaj fruktdonigos la semitan grainon.

NEKROLOGIO.

En la komenco de Decembro mortis subite la patro de D^{ro} Zamenhof. La Esperanta mondo scios tiun funebran informon kun premanta emocio. Je la nomo de la Belgaj Esperantistoj ni adresas al nia Majstro kaj al lia familio la esprimon de nia kondolenco kaj la certigon de nia simpatia sento.

AKCEPTO DE KOMANDANTO CH. LEMAIRE EN BOULOGNE SUR MER.

La akcepto de la Prezidanto de la Belga Ligo okazis dum la sabato 30^a de novembro; S^{ro} Farjon, prezidanto de la Societo de Geografio kaj deputato de Boulogne, S^{roj} Duchochois, vicprezidanto de la Esperantista grupo, Derveaux, sekretario, kaj Sergeant, membro de la grupo, akceptis komandanton Lemaire kaj invitis lin al festeno, kiu okazis je la 8^a horo vespere. Bedaŭrinde la simpatia prezidanto de la grupo estis danĝere malsana kaj ne povis alesti al tiu festo; ni povas certigi al la amikoj de S^{ro} Michaux, ke la stato de lia sano estas nun multe pli bona. Je la festeno oni rimarkas ĉeeston de S^{roj} Farjon, deputato; Péron, urbestro; Farmer, vic-konsulo de Anglujo, k. c. S^{ro} Duchochois proponas toston al S^{roj} Lemaire kaj Michaux, kaj dankas S^{roj} Farjon kaj Péron. Post respondo de K^{to} Lemaire kiu proponas novan toston al S^{roj} Zamenhof, de Beaufort kaj Michaux kiuj estas la veraj propagandistoj en Francujo, S^{ro} Derveaux esprimas al K^{to} Lemaire la simpatian de la grupo por la unua pioniro en Belgujo. S^{ro} Péron deziras bonvenon al la Prezidanto de la Belga Ligo je la nomo de la urbo Boulogne, kaj S^{ro} Farjon deziras al li bonvenon je la nomo de la Societo de Geografio, kie K^{to} Lemaire estis parolanta la sekvantan dimanĉon.

En fino de la festo, komandanto Lemaire legis gravan raporton pri la reformoj proponitaj kaj la decidoj de la Delegacia Komitato, kaj de kiu la konkludo estis majstra alvoko por la unuanima harmonio; la parolinto ricevis grandan sukceson.

Ĉe publika biblioteko.

Malgranda dik-ventra burĝo eniras, ĉar li legis elpendaĵon:

Tie ĉi oni pruntedonas librojn.

Li alparolas la disdoniston:

— Donu al mi libron, mi petas.

— Kiun libron?

— Libron ajn.

— ?!... ?!... ?!...

— Dikan libron.

— Kian dikan libron??

— La plej dikan.

— Por kion fari ???

— Por sidiĝi sur ĝin!

LIEĜA GRUPO ESPERANTISTA

FONDITA DUM 1904.

Nuna komitato.

Prezidanto: Leŭtenanto Kolonelo de Troyer.

Vic-prezidanto: Doktoro Dupont.

Sekretario-Kasisto: S^{ro} Florent Ansiaux, 29, rue St Gilles.

Komisaro: Advokato Jean Jongen.

Bibliotekisto: S^{ro} Hoyois.

LA UNUA ĜENERALA KUNVENO EN LA INSULO WIGHT, ANGLUJO.

Lunde, 2^a Decembro, okazis en Shanklin en la ĉambrego, nome « Grays », ĝenerala kunveno de Esperantistoj disemitaj en la Insulo Wight. Kunvenis por trinki teon, laŭ la angla kutimo, samideanoj el Shanklin, Ventnor, Sandown, Ryde kaj Yarmouth. La ĉambrego estis tutplena. Kapitano von Herbert, prezidanto de la Shanklina Grupo, deziras bonvenon al la fremdaj anoj, kaj legis leterojn de la Postmajstro de Ventnor, kaj de S^o Godfrey Baring, bedaŭrante ke ili ne povu ĉeesti. Patro De Bom, la *belga* pastro katolika de Shanklin, faris, esperante, tre amuzan paroladeton. S^o Lorety legis premiverkon verkitan por la ekzameno por kapableco de la B. E. A. Sinjorino Blake legis ĉarman verketon esperantan. Ŝi senkulpigis la foreston de sia edzo D^{ro} Blake, la prezidanto de la Ventnor'a Grupo.

Pastro J. Conden Cole faris dankparoladeton je la nomo de la fremduloj, kaj fine, oni kantis la « Espero » kaj « Vivu la Reĝo Di ».

Sinjorino Blake, je la nomo de la ĉi tiea grupo, invitis ke la duan ĝeneralan kunvenon okazu en Ventnor, post la nova jaro.

Krom la paroladeto de Pastro Cole, kaj kelkaj vortoj de la prezidanto, oni parolis nur esperante dum la tuta kunveno.

RUĜA KRUCO.

Leŭtenanto Bayol kaj doktoro Dupont, helpmajorkuracisto, petas ĉiujn samideanojn militistojn, maristojn kaj ruĝkrucistojn, ke ili bonvolu sendi al ili kiel eble plej multon da dokumentoj, sciigoj, ilustraĵoj, fotografadoj, k. t. p. rilate al Ruĝa Kruceto de siaj nacioj:

sanitaraj manovroj,
personaroj militista kaj memilitista,
materialo,
organizo de la Societoj de Ruĝa Kruceto,
ambulancoj,
militospitaloj, k. t. p.

Ili estas skribontaj, multajn artikolojn kaj verkon « Ruĝa Kruceto » kun ilustraĵoj.

Bonaj propagandiloj estos por nia kara lingvo inter maristoj militistaroj kaj ruĝkrucistaroj diversnaciaj, kaj poste la sciigoj estos citata « elĉerpita el teksto esperanta de S-ro X... »

Antaŭan dankon!
Skribi al Leŭtenanto Bayol aŭ Doktoro Dupont, 51^a regimento infanteria, Beauvais (Oise) Franclando.

POSTULITAJ KLARIGOJ.

Ĉiutage, la Esperantistoj, kiuj verkas, estas haltigitaj pro necesaj klarigoj, pri kiuj ili ŝanceliĝas. Ofte ni ricevis leterojn pri tio, kaj ĉiuj ĵurnaloj ankoraŭ ricevas ofte demandojn similajn. Kelkaj ili ekzamenas la demandojn kaj respondas; tiel agas la ĵurnalo « Esperanto » el kiu ni ĉerpas la sekvantajn respondojn:

Al S-ro L. B. Pri la sufikso «ism». — La sufikso *ism* ne estis enmetita en la nomaro de la Esperantaj sufiksoj sendube pro tio ke ĝi estas jam internacia, kaj ke ĉiuj vortoj, kiuj posedas la finiĝon *ism* apartenas pleurajte al nia vortaro pro tiu kaŭzo, ke ili estas plene internaciaj. Tamen, via opinio, ke oni devus enkonduki tiun sufikson en la ĝisnunan Esperantan afiksaron estas tute aprobinda, ĉar tio forprenus multajn memstarajn radikojn el nia vortaro. Aliparte, ŝajnas al ni pli regule diri *katolikismo*, *mistikismo*, k. t. p., ol *katolicismo*, *misticismo*, kiujn ni jam vidis en kelkaj vortaroj. Pro tio ankaŭ, la enkonduko de *ism* estas dezirinda. La senco de tiu sufikso estas «sistemo, dogmaro, doktrino de...». Ekz.: socialismo, katolikismo, Calvinismo, materialismo, pozitivismo, k. c.

Al S-ro R. S. Pri la sufikso « ebl ». — La senco de tiu sufikso estas: kiu povas estis farata aŭ kiun oni povas fari; tiu senco estas esence pasiva (Ekz.: legebla = kiu povas esti legata); sekve meti tiun sufikson post verbo ne-transitiva estas erare, ekz.: vivebla, mortebla. Oni devas diri *vivema*, *mortema*, iom pligrandigante la sencon de *em*, kaj aldonante al ĝi la sencan « kiu povas fari », ĝis la momento kiam ni havos specialan sufikson por esprimi tiun ideon — kio ŝajnas al ni tre dezirinda.

BELGA LIGO ESPERANTISTA.

Multaj samideanoj ofte opiniis ke ia propaganda broŝuro estas tute necesa kaj eĉ eldonis foliojn aŭ broŝuretojn rapide disdonitajn.

Ni memoras ke la Ligo eldonis, en franca lingvo, tre taŭgan broŝuron, de kiu nova eldono aperis de la 1^a Januaro 1908; samtempe ĝi anoncas vendon de specialaj ŝlosiloj por la ne-esperantistoj parolantaj la franca lingvo.

La broŝuro kosta fr. 0.15 kaj la ŝlosilo fr. 0.05. Oni konsentas rabaton po kvanto. Skribu al la Sekretario de la Ligo,

53, rue de Ten Bosch,
Bruxelles.

BIBLIOGRAFIO.

- Ĉe Presejo S. Martino *Sro Em. Pettier*
Sve Radegonde (I & L) France.
Per Telefono, sceneto de Jacques Freneuze, tradukis
S^{mo} Josée Guivy fr. 0.15 sm. 0.06
Katolikaj Kunvenoj dum la tria Kongreso.
. fr. 0.25 sm. 0.10
- Ĉe J. H. Fred,
Bristo Place, Edinburgo, Skotlando.
Poŝkalendaro por la jaro 1908. six pence sm. 0.25

Ĉe Esperanto Verlag Möller & Borel *Berlin S.*
Unua legolibro, de Dr^o Kabe . . . M. 1,50 Smf. 0.75
Esperantista Poŝkalendaro por la jaro 1908 . . . Sm. 0.40

Ĉe A. J. Willeryck *4, Nieuwe Wandeling, Brugge (Belglando).*
Sprakleer en Oefeningen van de internationale taal Esperanto door M. Sebruyens-Vromant.
. fr. 1.00 fl. 0.50 sm. 0.40

Ĉe A. Marich *Budapest, IX, üllői-ut 59.*
Hungara Poemaro, N^o 4 Hel. 30 Sm. 0.126

Ĉe Presa Esperantista Societo *33, rue Lacépède, Paris.*
L'Esperanto par la Fable (Esperanto per fabeloj)
de Th. Cart. Kolekto de poŝtkartoj.
3 lecionoj. afrankite fr. 0.35 sm. 0.14
La tuta kolekto (12 lecionoj) fr. 1.10 sm. 0.44

La Problemo de l' Malarmo de Alfred H. Fried tradukis
Kapitano Alesiano. fr. 0.50 sm. 0.20

Ranratbatalo, herokomika verko de E. Deligny.
. fr. 0.40 sm. 0.16

Ĉe Higgie & Co *Rothsay, Scotland.*
Skotlanda Pejzaĝo. Albumo kun bildoj six pence sm. 0.25
Belega Skotlando, broŝureto. . . . 1 penny sm. 0.042

MUZIKO.

Ĉe Peder Früs *Frederiksborggade, 14
Kjobenhavn (Kopenhago).*
Esperanto Marsch, af Aug. Ellinger. Nemontrita prezo.

Ilustrita Revuo TRA LA MONDO.

Decembro.

ĜENERALA PLANO KAJ ENHAVO.

- Literatura vivado: Sully Prudhomme, de P^{re} Buquet kaj Odilino Prudent (Francujo).
Tra la Mondo: Passau, la bavara Venezia, de Zacherl Karl (Bavarujo).
Teatro: Kaprico, de Alfred de Mussel, tradukita de J. Flourens (Francujo).
Ĉiulanda vivado: La belgaj beginejoj, A. de Van der Biest-Andelhof (Flandro).
Militistaro kaj Maristaro: Submarveturado, de Marcel Finol (Francujo).
Diversaĵoj: Eduardo, reĝo de Britujo, F^{ino} A. Brown (Skotlando).
Turismo: Tendsporto, de L. de Guesnel (Francujo).
Ĉiulanda literaturo: El kuraceja vivado, de S^{mo} Hulanicza (Polujo). — Por paroli angle, el la Portugala lingvo.
Diversaj sciencoj: Grafologio, de H. Laisney (Francujo).
Pri Esperanto: La Kvara, de la Kvaro (Germanujo). — Bibliografio, Kroniko, de A. Montrosier kaj Steleto.
Miksaĵoj: Ludoj, Konkursoj..

JUS APERIS:
TEORIA KAJ PRAKTIKA KURSO
DE STENO-METAGRAFIO
de L. VAN DEN BOSCH & A. CAMBY.

2^a Eldono, en franca lingvo.
Lernolibro la plej utila por la lernado de la stenografio, la plej taŭga gvidilo por la profesoroj, la kursolibro la plej ŝatita por la lernantoj.
Unu volumo in 8^o, 134 paĝoj, bindo en angla tolaĵo.
Kosto: fr. 1.50. Poŝte: Belglando fr. 1.60.
Poŝta Unuigo: fr. 1.70.
Libro de la profesoro: fr. 1.00.
Specialaj kondiĉoj por la profesoroj.
Aĉetebla: rue Moons, 47, ANVERS (Belglando). (78)

La Revuo,

internacia monata literatura gazeto, kun konstanta kunlaborado de D^o ZAMENHOFF.

Ĉe Hachette k. K^o, 79, Boul^d St.-Germain, Paris.
Jare: Fr. 7. (2,80 Sm.)

La Signo Esperantista

estas
LA VERDA STELO
kaj

la verda stelo estas la SIGNO « GASSE »
la plej bela, — malkara, — simbola kaj scia, vere disvastigita internacie rekonilo esperantista; ne estante ŝtofa, ĝi ne difektiĝas.
Prezo fr. 1.00 (10 Sd.) afranke en Belgujo. Sin turni al la Administracio de la ĵurnalo.

SPINEUX & Co, Bruselo,

POLIGLOTA LIBREJO, FONDITA EN 1833
3, RUE DU BOIS SAUVAGE.
Vendas ĉiujn esperantajn librojn.
KORESPONDAS ESPERANTE.
TELEFONO N^o 3688. (89)

Lingvo Internacia

Monata centra Organo de la Esperantistoj
48 paĝoj (13x20 cm.), nur en Esperanto
Literatura Aldono, 16 paĝoj.
Jara abono: 7 fr. 50 (3 Sm.)

Juna Esperantisto

MONATA GAZETO POR JUNULOJ,
INSTRUISTOJ KAJ ESPERANTO-LERNANTOJ
Jara abono: 2 fr. 50 (1 Sm.)
ADMINISTRACIO
Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris.
Specimenaj numeroj estas senpage ricevebla

Esperantistoj!

AĈETU LA VINOJN KIUJN VI BEZONAS ĈE LA
Firmo ALFRED LAURENT-DESCOTTE

VINOJ
EN SOIGNIES (BELGIQUE).
Fondita en 1880.
Ĉefaj vinoj de Bordeaux kaj de Bourgogne.
Diversaj blankaj vinoj, Ĉampano, hispanaj kaj portugalaj vinoj
KORBOJ
povantaj enteni sortimenton da 20 boteloj da diversaj vinoj
Speciala prezo por Esperantistoj.
Oni korespondas Esperante. — Prezaro al dezirantoj.
Sendu la korespondaĵojn al
Sinjoro Alfred PUTSAGE-LAURENT,
VINOJ,
en HOUDENG-AIMERIES (BELGIQUE). (83)

Voyages privés et collectifs

Directeur: A. VAN DER SYP,
Bruxelles — 76, Rue LeFrancq, 76 — Bruxelles.

SPÉCIALITÉ DE VOYAGES DE LUXE POUR NOCES

à prix réduits et à forfait, avec prolongation facultatif des séjours dans chaque localité.

VOYAGES PARTICULIERS

pour une ou plusieurs personnes, avec itinéraires et organisation au gré des voyageurs.

Voyages collectifs pour tous pays,

accompagnés et dirigés, pour Familles et Sociétés, à partir de dix personnes.

BILLETS CIRCULAIRES. — RENSEIGNEMENTS GRATUITS.

Sinjoro Mathouillet

ano propaganda de S. P. P. E., kaj rajthavanto de l' tre potenca firma por burgondaj vinoj CHAMPY PÈRE ET Cie, el Beaune (Bourgogne), loĝos en Hôtel d'Harseamp, en Namur, de l' 1^a de Novembro ĝis la fino de Marto.

Li deziras trovi seriozajn agentojn en Verviers, Malines, Duffel, Hasselt, Wevelghem, Diest, Tongres, Courtrai, St. Trond. (78)

L'Année Timbrologique

ĈIUMONATA ORGANO DE LA KOLEKTANTOJ
de poŝtsignoj, ĵurnaloj kaj ilustritaj poŝtkartoj
estas unu el la plej bonaj iloj por publikigo kaj por la intersanĝantoj.

Ĝi ekzistas de 15 jaroj, kalkulas abonantojn en ĉiuj landoj de la mondo, kaj estas la OFICIALA ORGANO DE DEK FILATELAJ KAJ PRESAJ-AMANTAJ SOCIETOJ; al ĉiuj membroj de tiuj societoj, ĝi estas sendata devige.

JARA ABONO: 2 frankoj (80 Sd.) en ĉiuj landoj.
MALGRANDAJ ANONCOJ: 3 frankoj (1,20 Sm.)
por 12 enpresigoj po 4 linioj.
Sin turni al la Direktoro S^{ro} ARMAND DETHIER,
66, rue Floris, Bruxelles, Belgique.

La Belgique

artistique et littéraire,

Revue

NATIONALE DU MOUVEMENT INTELLECTUEL.

Paraissant en fascicules mensuels d'au moins 150 pages, **LA BELGIQUE** est la plus importante de nos publications périodiques. Elle publie des articles d'art, de littérature, de critique, d'érudition, etc., signés des noms les plus autorisés du monde intellectuel belge.

Tous les mois : **CHRONIQUE DES LIVRES** par M^{me} Blanche Rousseau, MM. Paul André, Arthur Daxhelet, Georges Dwelshauwers, Ernest Mahaim, Georges Marlow, Henri Maubel, Ed. Ned, Sander Pierron, Fernand Séverin, etc.

LES SALONS par Grégoire Le Roy.

LES THEATRES par Paul André.

LES CONCERTS par Eugène Georges.

ABONNEMENT :

BELGIQUE, 1 AN : 12 FR. 6 MOIS : 7 FR. 3 MOIS : 4 FR.
ÉTRANGER, " 15 FR. " 9 FR. " 5 FR.

LE NUMÉRO : 1 FR. 25 CHEZ TOUS LES LIBRAIRES.

BUREAUX :

26-28, Rue des Minimes, BRUXELLES.

LUEBLA.

Internacia Socia Revuo

MONATA ESPERANTA GAZETO

Internacie redaktata kaj ilustrata pri ĉio, kio interesas la homaran vivadon.

Redakcio kaj Administracio : 45, Rue de Saintonge, PARIS 3^e

Jara abono : 6 frankoj (2.40 Sm.) (pageblaj laŭvole kvaronjare fr. 1.75 (70 Sd.)

Abonantoj-monoferantoj ; Jare *almenaŭ* 20 fr. (8 Sm.)

Por ricevi unu numeron, oni sendu 60 cent. (24 Sd.)

The British Esperantist

Oficiala monata organo de la Brita Esperantista Asocio ; 12 paĝoj da novaĵoj k. c. angle-esperante, kaj 8 paĝoj da Aldono. Jare 4 fr. (1,60 Sm.)

Oni abonas ĉe la Sekretario de la B. E. A., 13, Arundel Street, Strand, London.

Internacia Sciencia Revuo

Oficiala Monata Organo de la

Internacia Sciencia Oficejo Esperantista

JARA ABONO : 2.75 SPESMILOJ -- 7 FR.

UNU N^o : 25 SPESDEKOJ.

Ĉe la Administracio kaj Redakcio :

6, rue Bovy-Lysberg en Genevo (Suisse).

Laŭ bezone, ankaŭ ĉe Administranto de La Belga Sonorilo.

" TRA LA MONDO "

Tutmonda multilustrata revuo esperanta

Nuntempaĵoj ; arto, literaturo, sciencoj ; komerc, industrio militistaro, maristaro ; teatro ; sportoj ; virina kaj gejunula paĝo ; felietono ; ludoj, konkursoj kun valoraj monaj premioj.

Ĉiuj artikoloj estas verkitaj de anoj de l' landoj pritraktataj ; senpaga specimeno laŭ peto al Administranto de T. L. M., 15, Bd des 2 Gares, Meudon (S. O). France, kaj al Administranto de la Belga Sonorilo.

Oni abonas « Tra la Mondo » ĉe la belgaj, holandaj ka danaj poŝtofiĉejoj.

Postulu « Tra la Mondo » en ĉiuj francaj stacidomoj.

Praktika Revuo de Komerciaj Sciencoj.

Redaktata en franca lingvo sub la direkcio de Sinjoro O. Orban, profesoro ĉe la Universitato de Lieĝo. — Eliras ĉiumonate dum naŭ monatoj, de la 15^a de Oktobro ĝis la 1^a de Aŭgusto.

Unu numero : 1.00 franko. (40 Sd.)

JARA ABONO : Belgujo : 5.00 frankoj. (2 Sm.)

Alilando : 7.50 frankoj. (3 Sm.)

Sin turni al la Direktoro, 26, rue Basse Wez, LIEGO (LIEGE).

L'Espérantiste.

Organe de la Société Française pour la propagation de l'Espéranto ; rédigé en français et en Espéranto. Directeur : M. L. de Beaufront, Louviers (Eure, France)

Abonnement simple . . . fr. 3.50 (1.40 Sm.)

Avec inscription à la Société fr. 4.00 (1.60 Sm.)